

Solvoj

4.2.

Flora havas vendejon kiu estas vere internacia. Ŝi vendas varojn el Eŭropo kaj Azio. Sed ŝi havas grandan problemon: klientoj venas al la vendejo, sed ili ne aĉetas la varojn, ĉar la varoj estas tro multekostaj. Kenĝi intervjuas Florian, sed detektivo interrompas ilin. Li montras al ili bildon de Ruselo. Ruselon serĉas la detektivo. Kiam li trovas lin, la kompatinda ŝafisto el Nov-Zelando iros al prizono.

4.3

1. Mankas al mi mono! Mi ne **havas** monon!
2. “Rigardu! Jen bela vazo!” diras Flora. Ŝi **montras** ĝin al Georgo.
3. Tri pomoj dancas en la manoj de Karlo. Li **ĵonglas** ilin.
4. “Tre malplaĉas al mi ŝafoj. Mi **abomenas** ilin!”
5. “Mi serĉis ĉie; kie ĝi estas, kie? Ha, jen ĝi! Mi **trovis** ĝin!”
6. “Hmm”, pensas Georgo: “Mi ne scias! Mi sciis hieraŭ! Mi **forgesis** lian nomon.”
7. La kosto estas 20 steloj. Ĉu vi **aĉetos** ĝin?
8. Georgo estas soifa; kaj jen la sovaĝa akvo! *Glut’, glut!* Li **trinkas** ĝin.
9. Danĝera ulo venas kaj prenas monon de Ruselo senpermeso. Li **ŝtelas** ĝin.
10. Karlo kuras kaj kuras. Je la dua horo li haltas. Li **finas** la kuradon.
11. “Ne! Tiu vazo ne estas por mi!” diras Georgo. Li ne **akceptas** ĝin.
12. “Kafo estas bona, sed teo estas *tre* bona. Mi **preferas** teon.”

4.4

1. “**Tenu** ŝin!”
Kion faras Kenĝi? Li **tenas** ŝin.
2. “**Prenu** akvon por ŝi.”

Kion faras Kenĝi? Li **prenas** botelon da akvo.

3. “Sinjorino ne trinkos el botelo. **Portu** glason.”
Kion faras Kenĝi? Li **portas** glason.
4. “**Verŝu** la akvon!”
Kion faras Kenĝi? Li **verŝas** la akvon.
5. “**Trinku** la akvon!”
Kion faras s-ino Bundo? Ŝi **trinkas** la akvon.
6. “Diru vian nomon!”
“Ve! Terure! Katastrofe!”
“Strangaj nomoj!”
“Ne! Vi ne komprenas. Ŝia nomo estas Flora.”
“**Literumu** ĝin, mi petas.”
“Fo, Lo, O, Ro, A.”
Kion faris Kenĝi? Li **literumis** ŝian nomon.